

# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO



Nº 210 OKTOBRO 2001


La numero : 2 euroj Abono: 7 € Kotizo: 3 € Sumo: 10 euroj

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO  
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)  
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE  
POUR L'ESPERANTO

\*\*\* *Sankta PIO X-a, preĝu por ni* \*\*\*

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM

## METU LA



## PREMON !

## Sommaire/Enhavo

Pages/*Paĝoj*

Le mot du président - <i>La bileto de la prezidanto</i>	2
Prière - <i>Preĝo</i>	4
<i>Raportoj pri kongresoj</i>	5
<i>Adoru, nova libro</i>	7
55-a IKUE kongreso	9
Kalendaro	11
Anoncoj	12
Abonnements - <i>Kotiztabelo</i>	14

**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**

Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto  
*Sendinto* 9, rue Paul Doumer  
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR

### Motif de non distribution

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres

Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

COLMAR (68)

Surkovrile

Bildo de la  
reklamkampanjo de  
CCFD (Comité  
Catholique contre la  
Faim et pour le  
Développement)

“ Por pli justa mondo :  
Metu la premon ! ”

informoj : [www.ccfcd.asso.fr](http://www.ccfcd.asso.fr)

L'esperanto. Face aux  
problèmes linguistiques, une  
langue neutre vraiment  
internationale pour les contacts  
directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas  
reprodukti kondiĉe ke estu  
citata la fonto. Specimenon  
kun represo aŭ tradukado  
oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la  
bulteno oni sendu al la  
redakcio nepre antaŭ la  
15.a de decembro 2001.  
Venonta bulteno aperos fine  
de decembro.

Finpresado la 30/10/2001

## FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Nro 210 Oktobro 2001

Trimonata eldonaĵo de  
Franca Katolika Esperanto  
Asocio (Association Catholique  
Française d'Esperanto A.C.F.E.)

CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:

S-ro A. BESSIERE  
28, Rue C. St-Saëns  
76000 ROUEN

Sekretario:

F-ino A.M. CHANEY  
56, Rue Corvisart  
75013 PARIS

Kasisto:

S-ro G. VILLENEUVE  
14, Rue Clair de Lune  
91530 SAINT-CHERON

Religia Konsilanto:

P-ro HEROUX  
Maison St-Joseph  
26400 ALLEX

Peranto IKUE:

S-ro PONS Roger  
Rue du 8 Mai 1945  
87510 NIEUL

Redakcio:

Fam. BASSO-RESCIO  
9, Rue Paul Doumer  
68920 WINTZENHEIM

Fakse 0389794333

Rete 100623.3022@Compuserve.com

## Le mot du Président

Dans le passé les changements de civilisation se sont toujours accompagnés d'une profonde crise des idées et des comportements. Il fut ainsi à la fin de l'Empire Romain, lors du passage du Moyen Age à la Renaissance, au siècle des Lumières.

Notre époque est sans conteste en crise profonde car notre civilisation fait une poussée de fièvre, annonciatrice de changements importants de notre mode de pensée et de notre manière de voir les problèmes qui nous assaillent de toutes parts.

Aujourd'hui comme hier cette situation est difficile à vivre pour ceux qui y sont confrontés. Mais faut-il s'alarmer ? Les lamentations sur la dureté des temps n'ont jamais résolu les problèmes. Déjà St-Augustin, qui vivait des temps semblables aux nôtres, remarquait, à juste titre, que le passé ne nous paraissait une époque heureuse que parce qu'il était un passé idéalisé.

Alors loin de céder au pessimisme ambiant, nous devons conserver la tête froide, établir notre pensée sur ce qui constitue les bases indéniables de notre Foi et savoir accepter de bon gré les évolutions portants, non sur les fondements de notre croyance, mais sur la couleur de l'emballage dont nous les enveloppons. Discerner l'essentiel de l'accessoire, c'est ce qui doit compter.

C'est dire que notre association doit pouvoir elle aussi balayer la poussière qui recouvre ses comportements surannés, prendre conscience de l'importance de ses idéaux pour les adapter au monde actuel afin que nous prenions un nouveau départ et que nous rayonnions notre Foi au travers de la pratique de l'espéranto, qui est un merveilleux outil de culture et de compréhension entre les hommes.

C'est la noble tâche à laquelle notre mouvement convie tous ses membres.

# La bileto de la prezidanto

Dum la pasinteco la civilizaciaj ŝanĝoj ĉiam kuniris kun grava krizo de la ideoj kaj agmanieroj. Tiel estis je la fino de la Romia Imperio, dum la transiro de Mezepoko al Renesanco, en la jarcento de la "Lumoj". (18a jarcento)

Nia epoko senkonteste trairas gravan krizon, ĉar nia civilizacio havas febran atakon, kiu anoncas gravajn ŝanĝojn en niaj pensmaniero kaj vidmaniero de la problemoj, kiuj alsaltas nin el ĉiuj direktoj.

Hodiaŭ kiel hieraŭ, tiu situacio estas malfacile eltenebla por la alfrontigantoj. Sed ĉu ni maltrankviliĝu? Priplorado pri la epoka malfacileco neniam solvis la problemojn. Jam Sta Augusteno, kiu vivis en epoko simila al la nia, prave rimarkis, ke la pasinteco ŝajnis feliĉan epokon, nur ĉar ĝi estis idealigita pasinteco.

Do tute male ol cedi al etosa pesimismo, ni devas havi klaran kapon, starigi nian penson sur la neegeblaj ĉefpunktoj de nia Kredo kaj ekscii propravole akcepti la evoluojn portantajn ne pri la bazoj de nia Kredo sed nur pri la koloro de la pakado en kiu ni metas ĝin. Distingi la plejgravaĵon de la akcesoraĵo, tio sola devas esti konsiderata.

Tio signifas, ke nia asocio devas ankaŭ klopodi balai la polvon, kiu surkovras ĝian eksmodan agmanieron, ekkonscii la pravecon de ĝia idealo por adaptiĝi ĝin al la moderna mondo, por ke ni prenu novan starton kaj radiu nian Kredon per praktikado de esperanto, kiu estas mirinda ilo de kulturo kaj kompreno inter la homoj.

Tio estas la nobla tasko, al kiu nia movado instigas ĉiujn siajn membrojn.

## FONTO KAJ RIVERETO

Vi neniam vidis la fonton, nur la rivereton.

La fonto ĉiam elverŝas akvon en la rivereton.

La fonto neniam indikas al la rivereto la farendan vojon.

La fonto estas fidela; ĝi donas la forton venki la barojn;

La rivereto haltiĝas nur post venko.

Dio estas la fonto,

Vi estas la rivereto.

Eĉ kiam ĝi serpentumas, la rivereto neniam vojeraras,

ĉar ĝi aŭdas la oceanan alvokon.

La fonto estas fidela; ĝi donas ĉion necesan eĉ por serpentumi.

Por atingi la oceanon, la rivereto devas akcepti ĉiajn akvojn,

kiujn ĝi renkontas survoje.

La rivereto neniam revenas al la fonto, eĉ kiam ĝi donas la impreson iri inverse; ĝia destino ĉiam puŝas ĝin antaŭen.

Dio estas la fonto

Vi estas la rivereto.

Ĉiam akceptema, la rivereto finfine perdiĝas;

ĝi ĉiam ĉeestas, sed ĝi kunligas sian vivon kun aliaj.

Komence ĝi estis rapida kaj bruema,

sed kiam ĝi alproksimiĝas al la vivofino,

ĝi fariĝas kvieta kaj pacama.

Kiam ĝi atingas la oceanon, tiu miriga tago estas samtempe

tiu de la unueco perfekte plenumita; ĝi fariĝas ĉion en ĉiuj.

Plenumita la celo, la rivereto fariĝas mistere inda estiĝi

fonto de ĉiuj aliaj riveretoj.

Ne forgesu: Dio estas la fonto

Sed vi estas la rivereto.

(nekonata verkisto)

## KONGRESO EN BARZA D'ISPRA (Italio)

De la 7-a ĝis la 11-a de septembro 2001 la italaj katolikaj esperantistoj kongresis en Barza d'Ispira, tutproksime de la lago "Maggiore".

Pli ol 50 samideanoj partoprenis tiun bone aranĝitan kongreson; inter ili estis kvin ne-italoj: tri francoj, unu ĉekino kaj unu hungarino.

La kongrestemo estis pri la vivo kaj agado de Rosmini, itala pastro (1655-1797). Tiu ĉi estis profeto pri la evoluo de la Eklezio kaj havis modernajn ideojn, kiuj efektiviĝis en la dua Vatikana Koncilio.

La tuttaga ekskurso kondukis nin ĉe la "Lago Maggiore". En la pitoreska kaj antikva ermitejo Sankta Katerina de la Sasso (S-ta Katerina apud la ŝtonego) ni ĉeestis la diservon; poste ni ŝipiris al Isola Bella (Bela insulo), kie ni tagmanĝis kaj poste vizitis la palazon Boromeo kaj ties belegan ĝardenonon. Finfine ni ŝipiris al Stresa, kie ni estis varme akceptitaj de la Rosmini-instituto, kiu klarigis la vivon kaj agadon de Rosmini.

La lastan tagon ni estis akceptitaj de S-ro Conti en sia esperanta ĝardeno, bele aranĝita kaj tutplene dediĉita al nia kara lingvo.

Venontjare la italoj kongresos en Lucca, en la proksimeco de Pisa.

LA REZULTOJ de la ENKETILO pri NIAJ KONGRESOJ

APEROS en nia VENONTA BULTENO Nro 211

Verkita de R.Chevallier.

Mi travivis unu semajnon en la ĉefurbo de Kroatio, kie mi retrovis la kutiman amikan etoson de Kongreso, kiam gesamideanoj renkontiĝas denove post disiĝo dum unu jaro. La urbo mem ne estas tre interesa. Antaŭ kelkaj jaroj la lando estis komunista kaj la popolo alkutimiĝis, ke la ŝtato decidu pri iu ajn afero.

La kongreso okazis en pluraj lokoj; unu estis rezervita al la kutimaj aferoj (kongresaj malfermo kaj fermo, teatraĵoj, koncertoj, prelego de gesinjoroj Robineau ...) alia estis uzata por oficialaj kunvenoj kaj bankedo, la kutima balo okazis alie sur la fama placo de la urbo kun la geloĝantoj. Feliĉe tiu malfacilaĵo havis kompenson: kun la ŝildo de la kongreso oni povis uzi senpage ĉiujn tramojn en la urbo. Tio estis tre ŝatata kaj uzata permeso. (Se oni povus ĝui la saman aranĝon dum la venonta kongreso en Fortalezo kie la kongresejo estos pli ol 6km for de la hoteloj, tio estus bona).

Post la kongreso mi vojaĝis kune kun aliaj francaj gesamideanoj dum unu semajno laŭ la marbordo ĝis Dubrovnik, kiu kuŝas proksimume je la latitudo de Romo. La vetero fariĝis pli kaj pli varma sed estas multaj plaĝoj aŭ strandoj kie multaj homoj baniĝis sen tro densa amaso.

Ĉie oni vidis ruinojn aŭ restaĵojn de romiaj konstruaĵoj, eĉ de imperia palaco. Unu akvokonduko, pluraj kilometroj longa, konstruita antaŭ pli ol 2000 jaroj, ankoraŭ funkcias por alporti akvon al moderna urbo. Multaj fremdaj armeoj invadis kaj submetis la landon dum jarcentoj; grekaj, romiaj, barbaraj, aŭstria, veneciaj, turkaj, slavaj, ... eĉ francaj dum la Imperio de Napoleono. Oni vidis ankaŭ domojn kaj vilaĝojn detruitajn de la Serboj antaŭ kelkaj jaroj.

Fine eble estas utila scii, ke laŭ la kroatoj, ili inventis la kravaton, kies nomo devenas de kroata.



# ADORU

## EKUMENA DISERVA LIBRO

Preparita de la Liturgia Grupo de la Ekumena Komisiono de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) kaj KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia)

Adoru estas

- > riĉ-enhava libro kun 1472 paĝoj
- > kun multaj kristanaj kantoj (kun muziknotoj)
- > internacie elektitaj melodioj kaj kantoj
- > bibliaj tekstoj kaj preĝoj por Diservoj kaj por privata uzo.
- > mes-tekstoj laŭ la oficiala meslibro.

Adoru estas

- > profesie presita sur eksterordinare maldika biblia papero 33-grama
- > do ne tro peza (540 gramoj) ; ne tro dika (3cm)
- > ne tro granda (10.5 cm x 19 cm)
- > solide bindita en helruĝa tola kovraĵo, aŭ por altvalore kun nigra leda kovraĵo kaj ora tranĉaĵo.

Kiel mendi: (por Francio)

al TAKE-ESPERANTO

90, Rue du Tiefenbach

F-68920 WINTZENHEIM

kun ĉeko de 19,80 euroj por unu ekzemplero de la helruĝa tola kovraĵo.

Specimenan paĝon de la libro en sekvanta paĝo.

ADORU ————— KRISTANA VIVO ————— 442


471

1. Dum ho-moj vi - vas sur la te-ro,  
2. Dum ho-moj ho-majn vor-tojn di-ras,  
dum fruk-tas gre-no kaj o - liv',  
dum vo - kas Vi - a vort' al pac',  
Vi por ni ĉi - uj es - tas pa - tro.  
Vi Vin de l' mon-do ne re - ti - ras.  
Ni dan-kas Vin pro ĉi - a viv'.  
Ni dan-kas pro Je - su - a grac'.  
3. Vi nutras birdojn en arbaro,  
Vi vestas florojn sur la kamp';  
fortika estas Vi remparo  
por ŝirmi nin en ĉiu temp'.  
4. Vi estas lumo, viv' eterna;  
de l' morto savas Via man'.  
Al ni Vi donis Vian filon;  
Li estas nia viva pan'.  
5. Al Vi ni do adoron faru,  
pro kies am' ekzistas ni;  
Vi, Patro, Vi enmeze staru;  
parencoj Viaj estas ni.

# 55-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista



**Kroměříž (Ĉeĥa Respubliko)**  
**20-27 julio 2002**



**KROMĚŘÍŽ**

**atendas vin**

## 55-a Kongreso de IKUE 20-27 julio 2002

### La kongresurbo

La nomo de la kongresurbo Kroměříž (prononcu Kromierzj) estas malfacile prononcebla por eksterlandanoj. La urbo troviĝas en Moravio - landparto de Ĉeĥa Respubliko, situanta surborde de rivero Morava (220 m super marnivelo). Ĝi estas urbo negranda (30 mil enloĝantoj), kiu per sia situo, beleco kaj signifo allogas vizitantojn el la tuta mondo. Ĝia Ĉefepiskopa Kastelo (iama sidejo de episkopoj kaj iliaj korteganoj de ĉefdiocezo Olomouc) kun vastaj kastelaj ĝardenoj estas envicigitaj en listo de mondaj kulturaj kaj naturaj heredaĵoj de UNESCO. Kaj nur kelkajn metrojn de la kastelo troviĝas la Ĉefepiskopa Gimnazio, kiu fariĝos agrabla kongresejo de la 55-a IKUE-Kongreso. Dekstra flanko de la Ĉefepiskopa Gimnazio estas per Muelila Portalo (Mlýnská brána) kunigita kun la kastelo. Maldekstre ĝi najbaras kun gotikstila preĝejo de sankta Maŭricio. Krom multaj aliaj historiaj vidindaĵoj en la urbo troviĝas preĝejo de sankta Johano la Baptisto, la barokstila perlo kaj paroĥa preĝejo de Ĉielenpreno de Beata Virgulino Maria, iama romanikstila konstruaĵo rekonstruita en novgotika stilo. Dum libera tempo oni povas ĝui belecon, promenante en ĉarma Florĝardeno, kastelaj ĝardenoj aŭ gustumi vinon en tute proksimaj Ĉefepiskopaj Vinkeloj.

Urbo Kroměříž estas atingebla peraŭtomobile, per trajne aŭ per buse. Peraviadile oni atingas urbon Brno, eventuale Pragon kaj de tie per trajne la urbon Kroměříž. Ĉiu aliĝinto ricevos detalajn informojn pri vojaĝkoneksoj, ebligantaj senprobleme atingi la kongresurbon.

### La kongresejo

La kongresejon prezentas al vi apuda bildo. Ĝi estas konstruaĵo de Ĉefepiskopa Gimnazio, iama Knaba Seminariejo por malkovro de vokiteco al sacerdoteco. Ĝi estas konvena por la kongreso. Ĉio okazos sub unu tegmento. Kapacito de la litlokoj estas 220 en sufiĉe grandaj ĉambroj, plejofte kun 3 litoj. En koridoroj de ĉiuj etaĝoj ekzistas bone funkciantaj necesejoj, lavejoj kaj duŝejoj kun varma akvo. En gimnazia konstru-komplekso ekzistas kui-

rejo kun du manĝejoj por pli ol 300 manĝantoj. Por kongresaj kunsidoj estas je dispono aŭlo kaj aliaj kunvenejoj. Por privataj aŭ grupaj preĝadoj ekzistas du kapeloj, por mescelebroj la apuda preĝejo de sankta Maŭricio. Surkoridore estas trinkaĵaŭtomatoj kaj eĉ bolaparatoj por pretigo de propra kafo aŭ teo.

Se iuj preferas loĝi en hotelo, ni proponas loĝeblecon en tre proksima hotelo Bouček sur la Granda Placo (Velké náměstí), tri minutojn de la kongresejo.

### Kongresaj kotizoj

pageblaj en ĉeĥaj kronoj, eŭroj aŭ US-dolaroj.

**Tarifo A:** Ĉiuj landoj sen B. **Tarifo B:** Eŭropa Unio, Skandinavio, Svislando, Nord-Ameriko.

1. **Kongresa aliĝ-kotizo** (ne repagebla) por ĉiu persono pagenda antaŭ la kongreso:

ĝis 31.3.2002: **A:** 10.- eŭroj, **B:** 20.- eŭroj

ĝis 31.5.2002: **A:** 15.- eŭroj, **B:** 30.- eŭroj

ekde 1.6.2002: **A:** 20.- eŭroj, **B:** 40.- eŭroj

*Gejunuloj malpli ol 25-jaraĝaj ĝuas 50% rabaton de la koncerna kotizo laŭ grupo/periodo.*

2. **Kongresa kotizo** pagenda en la kongresejo (inkluzivas tranoktojn, manĝojn, busvojaĝojn):

**A:** 90.- eŭroj, **gejunuloj** 50.- eŭroj

**B:** 140.- eŭroj, **gejunuloj** 80.- eŭroj

### Por Informoj ĉe :

TTT-paĝoj : [www.ikue.org](http://www.ikue.org)

Aŭ [Mujweb.cz/Spolecnost/Svacek](http://Mujweb.cz/Spolecnost/Svacek)

Retpoŝte : [msvacek@iol.cz](mailto:msvacek@iol.cz)

Perletere: IKUE-Katolika Sekcio de ĈEA

Tršická 6

751 27 PENCICE

Ĉeĥa Respubliko.

## KALENDARO

### 2002

#### STRASBOURG:

Franca Nacia Kongreso

20/07 Kromeriz (Ĉehio)  
 ĝis 55a IKUE Kongreso  
 27/07 Vidu anoncon en aliaj paĝoj

Augusto SEBRANICE (Ĉehio) apud Litomys  
 IKUE E-Tendaro.  
 En tendara frateca kaj amikeca etoso  
 Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas  
 haveblaj ĉe : IKUE-Katolika Sekcio  
 Trsicka ul.6 CZ-751 27 PENCICE .

03/08 FORTALEZZA (Brazilo)  
 ĝis 87-a Universala Kongreso  
 10/08 de Esperanto.  
 23/08 VERONA (Italio)  
 ĝis 5-a Europa Kongreso de Esperanto  
 28/08

Sept. LUCCA (Italio)  
 Itala Katolika Kongreso

## ANONCOJ

### 1/El Togolando

Salutojn, tre estimatajn gesamideanojn,  
 Ano de Unuiĝo Togolanda por Esperantistoj  
 Katolikaj (UTEK) kreita en 1989 en Lomé , mi atingis la  
 16-an de oktobro 2000 tiun porpastran seminarejon.

Ekde novembro 2000 mi daŭrigas la E-agadon kaj  
 dek unu kolegoj nun lernas nian internacian lingvon.

UTEK-anoj preĝas ,lernas biblion, predikas  
 evangelion , vizitas malsanulejojn kaj malliberejojn. Ili  
 preĝas la rozarion en esperanto ĉe la nacia Togolanda  
 katolika Radio Maria vendrede nokte je la 21-a horo.

Ni uzas kurson "Ferez". Nuntempe ni bezonas por  
 la bona funkcio de la movado materialon (kursaj  
 dokumentoj, vortaroj, Bibliojoj, preĝlibro k.t.p ).

Ĉu vi nin povus helpi ?

Jean-Louis Basile AGBOLD  
 BP 12316  
 LOME  
 TOGO.

2/ Serĉas vizitkartojn de esperantistoj. Tute egale  
 la kartoj estu aŭ ne en aŭ pri Esperanto, kaj cetere en  
 kiu ajna lingvo, ankaŭ profesiaj, privataj aŭ alitemaj.

La ĉefa afero estas ke ili koncernu esperantistojn.

Ankaŭ interesas min kartetoj de kuracistoj  
 (esperantistoj) por noti rendevuojn k.s.

Ĉu vi havas tiajn vizitkartojn (de vi aŭ de aliaj) por  
 kompletigi mian kolekton ?

Anticipan dankon pro viaj sendaĵoj kaj  
 kunlaboremo.

Jean AMOUROUX 1,Rue de Sorède  
 66100 PERPIGNAN.



## JUBILEAS PASTRO HEROUX

Nia religia konsilanto Pastro Héroux ĵus festis sian sacerdotan jubileon . Li ja ricevis la pastrecon la 7-an de oktobro 1951 en Chevilly apud Parizo.

Depost tiu tago pasis 50 jaroj; Pastro Héroux pasigis ilin plejparte en Afriko, kiel misiisto kaj ankaŭ profesoro. Li instruis la francan al anglaparolantoj kaj la anglan al la francaparolantoj.

Pli poste li esperantiĝis kaj multe laboris por nia afero en la katolikaj kaj ne-katolikaj medioj.

Okaze de lia sacerdota jubileo, ni gratulas Pastron Héroux pro lia agado sur la religia kaj esperanta laborkampoj kaj dankas lin pro lia grava rolo en nia asocio.

## GRATULOJ al la NOVA JUNA KATOLIKA KLUBO

<<Panjo de la tria jarmilo,

Rigardu per panja koro la infanojn de la tuta mondo:  
La infanojn ludantaj, tiujn kiuj kreskas kontentaj,  
Kiuj ridetas al la vivo kaj promenas en la espero.

Brakumu per via ama rigardo la infanojn laboristajn,  
La infanojn malsanajn, la infanojn de strato, la infanojn solajn,  
La infanojn soldatajn, la infanojn vunditajn de miroj,  
La infanojn malriĉigitajn de nia egoismo.


Akceptu en via koro la revojn de la tuta infanaro kaj agu,  
Por ke ili povu realigi iliajn revojn antaŭ la lumo de Jesuo  
Kaj de lia Evangelio.

Prenu je la mano la tutan homaron kaj konduku nin en vojetoj  
De paco, de justeco, de frateco. Amen >>

Per tiu-ĉi preĝo, estis anoncita la fondo de la nova esperanto-grupo en Apulujo (Regiono "Pouilles " en Italio) . Ĝi estas katolika kaj junula : fakte la anoj estas ĉiuj seminarianoj !!!

Adreso;

Nicola Ruggiero , corso A.De Gasperi 274/a I-70100 BARI



KULTURA ESPERANTO-DOMO

"Vera oazo en la dezerto de la lingva konfuzo"

Kastelo Grésillon F-49150 BAUGE

## Helpo-peto ...

**Greziljono** serĉas laboremulojn por la venonta somera programo (2002).

Estos bonvenaj *kursgvidantoj*, *prelegantoj*, *respondeculoj* por stud-periodoj (akcepto de staĝanoj, librotenado), *helpantoj pri mastrumado*.

Greziljono ne pagas salajron kaj ne repagas veturkostojn, sed proponas rabaton aŭ senpagan restadon (laŭ plenumitaj taskoj).

Informas "Kastelo Grésillon "

[kastelo.gresillon@free.fr](mailto:kastelo.gresillon@free.fr)

## Kotiztabelo 2002

### Internacia asocio

I.K.U.E kun revuo "Espero Katolika" : 25 eŭroj/jare

Peranto : S-ro PONS Roger

Rue du 8 Mai 1945

87510 NIEUL.

al kiu vi sendos ĉekon je la nomo de S-ro Pons.

### Franca asocio : A.C.F.E

A.C.F.E+"Franca Katolika E-isto unuopulo: 10 eŭroj

geedza paro : 13 eŭroj

gejunuloj ĝis 25jara, pastro, religiu(in)o : 5 eŭroj

bonfaranto : 30 eŭroj

Pagu al la kasisto : S-ro VILLENEUVE G.

14, Clair de Lune

91530 SAINT-CHERON

al kiu vi sendos ĉekon je la nomo de A.C.F.E

Dépot légal : 3eme trimestre 2001

C.P.P.A.P : N° 62532

Imprimé par : A.C.F.E à 9, Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM

Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris

sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996

Directeur : Albert BESSIERE

Directeur délégué: Michel BASSO